

Kiel uzi

Pri la celo kaj aplikeblo de tiu ĉi **Elĉerpaĵo por Eventoj**

Ĝi estis verkita kiel "etkurso" por grupoj speciale organizitaj por **sola evento**, per 9 hora lernado, ekzemple dum tuta semajnfino, en esperantista evento aŭ similaĵo. Ĝi celas prezenti Esperanton kiel **paroleblan lingvon**.

Ĝi provizas elementan komunikadon per Esperanto en la plej rutinaj socikulturaj situacioj, kiel: *salutoj kaj ĉiutaga frazaro; la alfabeto; prononco; sinprezento al nekonatoj; pronomoj; verbaj tempoj kaj modoj; identigo de homoj kaj de aĵoj; kiel demandi; adjektivoj; bazaj numeraloj kaj formado de ceteraj numeraloj; kiel diri adresojn, telefonnumerojn kaj datojn; la kalendaro; la pioniroj de Esperanto; ekzercaro eksterklasa kaj vortlisto laŭpaĝa, kun ĉirkaŭ 390 vortradikoj;*

Tiu versio estas senpage prenebla de la kursgvidanto, kiu tamen rajtas postuli modestan pagon de siaj lernantoj, por kovri printkoston.

Jen kelkaj sugestoj/proponoj pri plej efika apliko de tiu ĉi instrumaterialo.

Vi bezonos kelkajn senpage preneblajn materialojn el la **helpa dokumentujo** de la paĝaro www.lernejaklasoj.info, kie vi trovos serion da ekzercoj, diktaĵoj ktp.

Gravas komprenigi al la lernantoj ke lingvon oni lernas per la tuta korpo, ĉar tiel oni senĝene konversacias en ordinara vivo per etnaj lingvoj. Do ili devas ludi aktorece la tutan tempon, rigardante rekte al siaj kunaktorantoj kaj montrante per mienesprimoj kaj korpesprimoj.

Gravas kompreni ke, se vi tro atentis enklase la plej mallertajn lernantojn, vi riskos perdi la kontrolon de la tuta grupo, ĉar la klaso perdos fokuson kaj intereson kaj tuj komencos babili nacilingve aŭ manumi siajn poŝkomputilojn. La ŝajnaj mallertuloj sentos la bezonon sekvi la grupon, por ne perdiĝi. **Tempo ludas esencan rolon** en tiu ĉi intensiva kurso.

Klarigo de novaj vortoj: - Ĉiel evitu traduki. Ekzemple pri *verboj trovi, perdi, serĉi, aktoru*, kvazaŭ vi estus perdinta ion. Tamen, se klarigo de vorto en Esperanto malŝparos troan tempon, ne hezitu turniĝi momenteton al nacia lingvo.

Pri la enkonduka nacilingva leciono, paĝo 3. - Ne perdu tempon. Simple disdonu la tekstofolion kiel hejman taskon.

Pri la ceteraj lecionoj - Gravas ĉiam konsulti la grizajn marĝenojn de la gvidlibro de la instruistoj, kie vi trovos indikojn kaj sugestojn pri plej efika maniero enkonduki tiun aŭ sekvan lernotaĵon

Pri la ekzercaraj paĝoj - Vi ne havos tempon kontroli kaj korekti la hejman laboron de la lernantoj. Ne gravas, ĉar temas pri rapida, intensiva kurso. Plej gravas la enklasa strebo de la lernantoj.

Pri la laŭpaĝa vortlisto - Laŭlonge de la lecionoj kelkaj vortoj aperas pli helaj kaj klinitaj. Ili unuafoje aperis en la tekstoj kaj postulas klarigeton. Ili reaperas listigitaj laŭpaĝe je la fino de la instrumaterialo. Esploretu neinsisteme kun ili tiujn vortojn antaŭ ol reveni al la koncerna teksto, sed ne esperu pri tuja kompreno.

Ne perdu tempon provante lekci. Laŭ tiu ĉi metodo vi ne rolos kiel profesoro, sed kiel grupa reĝisoro.

Vigle ĝuu la instruadon per nia etkurso!